# *Unesko uzos Esperanton en festivalo*




Esperanto kaj Unesko estas ligitaj per komunaj celoj kaj pri tio atestas la du deklaroj de tiu ?i internacia organo pri kulturo kaj edukado rilate la utilecon de la internacia lingvo.

Kiel priskribas la universala deklaracio pri kultura diverseco de Unesko,  kulturaj rajtoj estas integra parto de homaj rajtoj, kiuj estas universalaj, nedivideblaj kaj interdependaj.  Por ke la kultura diverseco floru, necesas ke oni komplete plenumu la kulturajn rajtojn, kiel ili estas difinataj en Artikolo 27 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kaj en Artikoloj 13 kaj 15 de la Internacia Konvencio de Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj.

Tial, ?iuj personoj devus povi esprimi sin kaj krei kaj disvastigi siajn verkojn en la lingvo, kiun ili mem elektas, precipe en ilia propra gepatra lingvo; ?iuj personoj devus rajti al altkvalitaj edukado kaj trejnado, kiuj plene repektas ilian kulturan identecon; kaj ?iuj personoj devus povi partopreni en la kultura vivo, kiun ili mem elektas, kaj realigi la proprajn kulturajn praktikojn, en la kunteksto de repekto al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.

La esperanto-komunumo havas laborgrupon pri UN kaj Unesko rilataj temoj kaj ?i aktive laboras en amba? institucioj. Tiamaniere esti?as kunlaboraj agadoj kiel tiu ?i aparta  uzo de Esperanto en porpaca festivalo. Kiam ?i okazos?

La 19-an de septembro 2020, post unu jaro,  Unesko okazigos festivalon por la paco en Tolosa (Hispanio). La laborlingvoj de tiu ?i festivalo estas la franca, la angla, la hispana kaj Esperanto.

Dum tiu ?i festivalo, anka? estos projekciitaj filmetoj de kiel eble plej da korusoj tra la mondo, kantantaj por la paco en plej diversaj lingvoj, sed la tekstoj de tiuj ?i kantoj devos esti tradukitaj al unu el la kvar laborlingvoj: franca, angla, hispana a? Esperanto.

Tial UEA kaj ties laborgrupo informas ke se esperantistoj tra la mondo  konas koruson, kiu povus realigi tian 3-minutan filmeton de kanto por la paco, en iu ajn lingvo (kun traduko de la teksto al Esperanto) a? rekte en Esperanto, kontaktu la UEA-reprezentanton ?e Unesko d-ro François Lo Jacomo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/especiales/exclusivas/199386-unesko-uzos-esperanton-en-festivalo

**Radio Habana Cuba**